

JURA
TRIBUNO
INTERNACIA



N-ro 11
Jaro 2012
Esperanta Jura Asocio

Eldonas: ESPERANTA JURA ASOCIO
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Poŝta Adreso: José María Rodríguez Hernández
JURA TRIBUNO INTERNACIA
Apartado de Correos 3142
E-14080 CÓRDOBA (Hispanio)

Elektronika Adreso: esperanto14@ono.com

Direktoro: José María Rodríguez Hernández

Kunlaboris ĉi-numere: D-ino Rafaela Urueña Álvarez
Prof. Luis Córdova Arellano

La revuon ricevas ĉiuj membroj de EJA. Por aliĝi al nia asocio informoj aperas sur la paĝo 7-a

Depósito Legal: CO-844/97
Edita: Asociación Andaluza de Esperanto
Apartado de Correos 611
14080 Córdoba
Imprime: Litopress SL

ENHAVO

	Paĝo
Prezento	5
Vivo de la Asocio kaj Esperantaj Juraj Informoj	9
Kunsido de Esperanta Jura Asocio	12
Skizo de la Politika kaj Juraj Strukturoj de Vjetnamo	14
Lingva Diverseco. La Kunoficialeco de la lingvoj en la konstituciaj leĝoj de Hispanio.	16
Internacia Adopto kaj la rajto je la privata kaj familia Vivo	29
Juraj Vortoj: <i>Hipoteko</i>	34
Juraj Informoj:	
• Palestino aliĝas al UNESKO kiel plenrajta membro	37
• Denove pri manko de akvo	39
• Vet-ludistoj rajtas uzi statistikajn kalkulojn	41

PREZENTO

Nia mondo vivas pli kaj plie en tuj apuda rilato. Ne nur kunvenas jam la ŝtatoj kaj la registaroj, sed ankaŭ la civitanaro uzas la sociajn retoj kiel taŭgaj kontaktiloj spite al kia ajn landlimo. Eĉ Unuiĝintaj Nacioj konscias pri tio kaj ĝuste nun renkontiĝas en Rio de Janeiro la UN-konferenco pri Daŭripova Evoluo (RIO+20), kie ŝtatestroj, politikistoj kaj reprezentantoj de la civila socio kunvenas. Samtempe okazas Kupolo de la Popoloj, kie renkontiĝas miloj da NRO-representantoj por observi la laborojn de la registaraj reprezentantoj kaj por komune ellabori proprajn proponojn surbaze de spertoj konkretaj kaj ne nur teoriaj.

Unu el tiuj praktikaj proponoj prezentataj en Rio de Janeiro, sed realigita ĉiutage sur ĉiuj partoj de nia mondo, estas nia internacia lingvo. La civitanoj de nia mondo facile kontaktas unu kun la aliaj pere de la sociaj retoj, tamen oni bezonas ion pli. Estas necese disponi pri kontaktilo faciliganta tiun deziron konstrui ion favore al la Homaro. Kompreneble ne nur esperanto estas tio kio povas unuigi la Homaron, multaj aliaj solvoj ekzistas, sed sendube, nia lingvo estas unu el la plej praktikaj ideoj kaj dum la lastaj 125 jaroj ĝi montris sian utilecon.

Jen la tasko de nia internacia asocio EJA, aŭ almenaŭ unu el ĝiaj celoj: enirigi la internacian lingvon en la juran mondon; montri, ke pere de esperanto oni povas proponi studojn, projektojn, agad-planojn por faciligi la paceman vivon inter ĉiuj homoj, kaj jen unu el la ĉefaj taskoj ankaŭ de UN.

Nia asocio EJA vivis pasintjare ŝanĝon en sia estraro. Novaj homoj alvenis, kompreneble ne estas facile kunordigi la agadojn de personoj kiam ili troviĝas ĉe distancaj lokoj, sed ni pruvis fari tion. Novaj projektoj realiĝis: kurso ĉe la Jura Fakultato en Meksika Universitato; propono por la organizado de interreta kurso pri homarana juro kaj ankaŭ la eldonado de ĉi tiu nova numero de nia revuo. Do, mi

volas danki al ĉiuj kunlaborantoj, speciale al D-ino Rafaela Urueña, nia prezidantino kaj ankaŭ al Luis Córdova, nia nelacigebla sekretario.

Do, mi invitas al Vi legi nian revuon. Ene de ĝi Vi trovos informojn pri nia asocio, ĉefe pri la lasta kunveno kiu okazis en Kopenhago; ankaŭ mallongajn informojn pri juraj temoj, inter kiuj oni devas elstari la prezenton de libro en Brazilo fare de nia samideano Prokuroro Cesar Barros Leal. Mallonga skizo temas pri la jura strukturo de Vjetnamo, ĉar nia revuo oficiale prezentiĝos en tiu lando okaze de la Universala Kongreso de Esperanto. Rilate la eseojn, Vi povos koni la nuntempan lingvan situacion de Hispanio post la aprobo en la jaro 1978 de ĝia konstitucio, kiu ebligis la kun-oficialecon ne nur de la kastilia lingvo, sed ankaŭ de aliaj lingvoj, ja tio estis mejloŝtono en la vivo de Hispanio, kiu dumtempe eĉ malpermesis kian ajn uzon de tiuj lingvoj. Alia artikolo pritraktas juĝon de Eŭropa Kortumo pri aferoj rilataj al familio, rilatoj inter adoptanto kaj adoptito kaj ĉefe pri la valideco de juĝa decido proklamita en alia ŝtato. La paĝo pri jura vortaro parolas pri la vorto *hipoteko* kaj pri ĉiuj tiurilataj vortoj, kun la celo faciligi la uzon de la plej aktualaj juraj terminoj en nia lingvo. Kaj fine mallongaj informoj verkitaj de nia prezidantino parolas pri aferoj rilataj al UNESKO.

Do, kiel oni kutimas diri, ĝuu ĉi novan numeron. Nia asocio prezentos ĝin okaze de du baldaŭaj renkontiĝoj, tiu de Eŭropa Esperanto-Unuio, okazonta en Galivo (Irlando) kaj poste okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo (Vjetnamo). Du malproksimaj lokoj en nia malgranda planedo, sed tuj apudaj se temas pri lingvoj, ĉar en ambaŭ lokoj Galivo kaj Hanojo nia lingvo faciligos la rilatojn de homoj kun homoj.

José María Rodríguez Hernández
Direktoro de JURA TRIBUNO INTERNICIA

ALIĜU AL ESPERANTA JURA ASOCIO

Ordinara membro devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri juro aŭ esti studanto por tia diplomo. Ĉiu alia persono povas peti aliĝon kiel asocia membro. Membroigo kostas 7 eŭrojn se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latina Ameriko. Kaj 14 eŭrojn se vi loĝas en alia lando.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r (pri pagmanieroj vidu en la *Jarlibro* de UEA). Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al la sekretario luisesperanto@yahoo.com aŭ al la elektronika adreso: esperanto14@ono.com



Kunlaboru kun ***JURA TRIBUNO INTERNACIA***

Se Vi emas verki en esperanto pri juraj temoj ni plezure aperigos Viajn kontribuaĵojn en niaj paĝoj. Vi nur devas atenti pri la jenaj kondiĉoj:

ARTIKOLOJ: rilataj al iu jura branĉo. Do: krimpuna, ekonomia, imposta, civila, internacia, historia, filosofia, administracia, ktp. Pri la longeco, pli malpli 4/10 foliojn A4 (unuflanka duobl-spaca). Se eble aldonu kelklinian resumon pri la artikolo.

RECENZOJ: Vi povas recenzi verkon. La libro elektota devas temi pri Juro, kvankam ne necese pri/en esperanto. La libro povas esti redaktata en kiu ajn lingvo, tamen la recenzon oni devas verki en esperanto.

INFORMOJ: Vi povas informe pere de ĉi tiuj paĝoj pri juĝoj, novaj leĝoj, internaciaj aferoj, traktatoj, ktp, aŭ pri io rilata al la Juro en Vialando aŭ komunumo. La informoj devas ampleksi 1/3 foliojn.

TRAKTATOJ: se Vi tradukis kelkan internacian traktaton, aŭ scias kie aperas la Esperanto-traduko de kelka internacia kunveno, informu al ni pri tio.

Ne dubu kunlabori kun la jura revuo. La proksima numero aperos dum la monato junio 2013, do, prefere se oni ricevas la materialon antaŭ la fino de la monato majo 2013.

La redakciaj adreso estas:

✉ *Jura Tribuno Internacia*. Apartado de Correos 3142 E-14080 Córdoba (Hispanio)
💻 esperanto14@ono.com

VIVO DE LA ASOCIO KAJ ESPERANTAJ JURAJ INFORMOJ

★ **Kurso de esperanto en Jura Fakultato de Meksiko.**

Organizata de la Sekretario de Esperanta Jura Asocio, S-ro Luis Córdova Arellano, la pasintan 21-an de februaro okazis prelego pri la internacia lingvo esperanto ĉe la Jura Fakultato de la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko.

Post la prelego, kaj ĝis la fino de la monato marto, oni organizis kurson de la internacia lingvo en la Jura Fakultato mem. Ĉeestis dekkvino da gelernantoj kaj la profesoro estis nia samideano Luis Córdova, helpis ankaŭ Martin Schäffer, germana esperantisto loĝanta en Meksiko.



S-ro Martin Schäffer alparolas la gepartoprenantojn en la kurso de esperanto organizata ĉe la Jura Fakultato de la Nacia Aŭtonoma Universitato de Meksiko. *Fotis Luis Córdova*

Gratulon al Luis Córdova pro la sukceso organizi kurson en la Universitato, kiu sendube vekis la intereson de juraj gelernantoj.

★ **Nia Samideano Prokuroro CÉSAR BARROS LEAL verkis juran libron.**

La Prokuroro de Ŝtato Cearao en Brazilo, S-ro César BARROS LEAL, lanĉis la libron *“Vigilância Eletrônica à Distância: Instrumento de Control e Alternativa à Prisão na América Latina”* (*Distancia Elektronika Kontrolo: Kontrolilo kaj Alternativo al Enprizonigo en Latin-Ameriko*). La verko estos eldonita ankaŭ en esperanto.

Cesar BARROS LEAL estas Doktoro pri Juro kaj Post-Doktoro pri Latin-Amerikaj Studoj en Aŭtonoma Nacia Universitato de Meksiko, Profesoro en la Jura Fakultato de Federacia Universitato de Ŝtato Cearao, ano de la Konsilantaro de Tut-Amerika Instituto pri Homaj Rajtoj kaj membro de Beletra Akademio de Ŝtato Cearao. En la jaro 2002 li publikigis la libron *“Enprizonigo: krepusko de erao”*, tradukita en esperanton de James Piton.



S-ro Cesar BARROS LEAL parolas okaze de la prezento de la libro.

www.liberafolio.org

★ **Kurso pri Internaci-Jura Afero kadre de la Universitato de Esperanto en Ĉinio.**

Sur la suda ĉina insulo Hai Nan Dao, okazis inter la 14-a de januaro kaj la 12-a de februaro 2012, la unuaj provkursoj de la projekto nomata “Universitato de Esperanto”. En tiu universitato komenciĝos la kunstudado kaj kunlaborado inter homoj de Ĉinio kaj homoj el landopartoj el la tuta mondo. Temas ne nur paroli esperanton, sed ankaŭ lerni, studi kaj interŝanĝi ideojn pri diversaj faktemoj.

Unu el tiuj kursoj temas pri “Paco kaj Milito”, la profesoro estas S-ro Ron GLOSSOP de Usono. La Profesoro GLOSSOP estas la aŭtoro de prestiĝa libro “*Confronting War*” (*Alfronti Militon*) jam kvarfoje eldonita en la angla lingvo kaj espereble baldaŭ ankaŭ en esperanto.



Gepartoprenantoj en la “Universitato de Esperanto”, komence de 2012 en Ĉinio.

KUNSIDO DE ESPERANTA JURA ASOCIO

La 26-an de julio, je 15:30 horo, 27 juristoj partoprenis, en salono *Noll* de la Kongresejo, dum la Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, la tiujaran kunsidon de Esperanta Jura Asocio –EJA–.

En la komenco, la Prezidantino de EJA disdonis la numeron de la revuo “Jura Tribuno Internacia”, kaj sekve raportis pri la pasintjara kunsido en Havano (Kubo), en kiu estis elektita nova estraro kaj, nun, S-ro Bronislav KIERES akceptis esti voĉdonanto en la nova estraro.

Laŭ propono farita en Kubo pri la ebleco prelegi pri la dana jursistemo, danke al la klopodoj de S-ro CHAPMAN kaj S-ino Ileana SROEDER (Prezidantino de la LKK), D-ro ZIEGLER, Prezidinto de la Dana Supera Kortumo, prelegis pri la temo “Danaj Kortumoj kaj la proceduro en civilaj kaj kriminalaj kazoj”. Tiu prelego okazis ene de la serio “Prelegoj pri Danio” ĉe la salono *Neergaard*. Tiu akto okazis ne nur por ni, juristoj, sed ankaŭ por la ĝenerala publiko ĉeestanta la kongreson.

D-rino URUEÑA, Prezidantino de EJA kaj S-ino NIKOLAEVA prezidas la kunsidon. (foto *L. Hernández*)



Poste, oni raportis pri la Asocio kaj ĝia ekonomia situacio, dum la Prezidantino instigis la membrojn pagi la kotizon pere de la konto ĉe UEA, aŭ dum la Kongreso. Ankaŭ oni dankis la redaktoron de la revuo S-ro José María RODRÍGUEZ kaj la Prezidanton de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, S-ro Ángel ARQUILLOS, kiu ĉeestis la kunsidon,

pro ĝia kunlaboro en la eldonado de nia revuo, kaj oni petis al la ĉeestantoj sendi artikolojn kaj kunlaboraĵojn por nia revuo.

S-ro CHAPMAN proponis, ke dum la venontjara kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio, okazonta en Irlando, juristoj povu kunsidi kaj eĉ viziti kelkan kortumon. Laŭ propono de S-ro KIERES, povus okazi same en Vjetnamo okaze de la venontjara Universala Esperanto-Kongreso.



Ĝeartoprenantoj en la kunsido, trafoĵiumas la lastan numeron de *Jura Tribuno Internacia*.

(foto L. Hernández)

S-ro FARIA DE BASTOS, de Portugalio, akceptis prelegi dum nia venontjara kongreso en Hanojo pri la praktika jur-sistemo en Portugalio kaj Angolo, ene de nia jara kunsido.

Diversajn demandojn kaj proponojn oni prezentis dum la kunsido, inte ili, S-ro Eros BISCOTTO, de Brazilo, pri la taŭgeco kunporti al la kunsido aliĝilojn por Esperanta Jura Asocio; S-ro OSIBOV rimarkis la novan pozitivan vojon de nia asocio kaj la taŭgecon prezenti inter ni la diversajn lokajn jurajn sistemojn, se eblas, ankaŭ en Vjetnamo. Fine, pluraj ĉeestantoj esprimis siajn deziron regule ricevi nian revuon.

SKIZO DE LA POLITIKA KAJ JURA STRUKTUROJ DE VJETNAMO

Vjetnamo estas socialisma respubliko kun ununura partio: la Komunisma Partio. Pere de balotado, laŭ universala voĉ-donado, oni elektas la membrojn de la Provincajn Popolajn Konsiliojn kaj ankaŭ tiujn de la Nacia Asembleo (*Quoc-Hoi*), ĉi-lastaj elektas la ĉef-ministron. La liston de elektontoj ellaboras la Patriota Fronto, aro da politikaj kaj sociaj organizoj al kiuj apartenas ĉiuj sociaj, religiaj kaj etnaj grupoj, eĉ de vjetnamanoj loĝantaj eksterlande.

La politikan strukturon de Vjetnamo oni organizas ĉirkaŭ tri fundamentaj figuroj: la Ĝenerala Sekretario de la Komunisma Partio; la Prezidanto de la Respubliko kaj la Ĉef-ministro.

La 11-a Kongreso de la Komunisma Partio okazis dum la monato januaro 2011. La Kongreso aprobis la bazajn agad-liniojn de la ekonomia politiko de Vjetnamo dum la proksimaj 10 jaroj. En majo 2011 okazis ĝenerala balotado por elekti la membrojn de la Nacia Asembleo, kiu nomumis la novan registaron sub la prezido de *Nguyen Tan Dung*, kiu estas la ĉef-ministro dum la periodo 2011-2016. La Kongreso ankaŭ elektis la novan Ĝeneralan Sekretarion de la Komunisma Partio, *Nguyen Phu Trong*. La Prezidanto de la Respubliko estas *Truong Tan Sang*.

La ĉefa dokumento aprobita de la Komunisma Partio celas atingi ekonomian 7%-8% kreskon ĉiujare kaj atingi en la jaro 2020 porpersonan enspezadon nacian de 3,000\$. Ankaŭ oni decidis daŭrigi la agad-planon *Do Moi* (Renovigo), kiu celas enirigi la privatan sektoron en la nacian ekonomion de Vjetnamo. La enirigo de la lando en ASEAN (Asocio de Sud-Orient-Aziaj Nacioj) kaj en MOK (Monda Organizaĵo pri Komerco) sendube akcelis la malfermon de la ekonomio de Vjetnamo al la cetera mondo.

Rilate la juran strukturon de Vjetnamo, sur la pinto troviĝas la Popola Suprema Tribunalo, kies ĉef-juĝisto estas nomumita de la Nacia Asembleo, proponita de la Prezidanto de la Respubliko. Al ĉi tiu Suprema Tribunalo apartenas la Konsilio de Juĝistoj de la Supera Tribunalo, la Centra Armea Tribunalo, La Pun-Tribunalo, la Civil-Tribunalo kaj aliaj kortumoj specifaj por ekonomiaj, laboraj kaj administraciaj aferoj. Tiu Konsilio de Juĝistoj gvidas la agadon de la ceteraj juĝistoj por unuigi la aplikadon de la leĝaro. Ekzistas ankaŭ tribunaloj en ĉiuj provincoj (*tin*h), 58 entute, kaj 5 gravaj urboj.

Alia jura figuro en Vjetnamo estas la Suprema Popola Prokuroro, kiu kontrolas la plenumon de la leĝoj fare de la registaraj organismoj, kaj ankaŭ de la provincaj kaj urbaj aŭtoritatoj, de ĉiuj ekonomiaj kaj sociaj grupoj kaj ĝenerale de la tuta civitanaro.



Sidejo de la Popola Suprema
Tribunalo en Hanojo



Popola Provinca Kortumo en Ho-
Ĉi-Min Urbo

LINGVA DIVERSECO.

LA KUN-OFICIALECO DE LINGVOJ EN LA KONSTITUCIAJ LEĜOJ DE HISPANIO

✉ José María Rodríguez Hernández
Hispanio

I. LINGVAJ RAJTOJ KAJ DISKRIMINACIO PRO LINGVAJ AFEROJ

La ekzisto de malsimilaj lingvoj ĉe sama teritorio estas unu el la plej oftaj kaŭzoj de ne-egaleco kaj eĉ de diskriminacio inter homoj apartantaj al malsimilaj sociaj grupoj. Komune, ĉi tiu problemo prezentiĝas kiel afero simila al la protektado de minoritatoj, pro la fakto, ke ekzisto de lingva diverseco kutime rilatiĝas al la ekzisto mem de minoritata homa grupo ne-parolanta la lingvon de la plimulto. Tiel, oni parolas pri *regionaj lingvoj* aŭ *lingvoj de minoritatoj*, cele distingi ilin de tiuj lingvoj efektive parolataj de minoritato, sed amase uzata ĉe konkreta zono¹.

Prezentita ĉi tiel la afero, evidentas, ke temas pri problemo rilata la respekton kaj protektadon de minoritatoj, tio estas, afero rilata al la principo pri egaleco, ĉar estas nepre garantii ne-diskriminacian traktadon al la membroj de grupo parolanta minoritatan lingvon kaj eviti tiel, marĝeni ilin kiam oni uzas lingvon ne-apartenanta al la plimulto. Tamen, la pristudo de la lingva diverseco ne devas limigi sin al nura garantio de egaleco, aŭ de forigo de la diskriminacio; kontraŭe ĝi estas bazo necesa por reguli la lingvan diversecon el demokratia perspektivo de la fundamentaj rajtoj.

¹ SANMARTI ROSET, Josep M. *Las Políticas Lingüísticas y las lenguas minoritarias en el proceso de construcción de Europa*, 2002 Doktora Tezo ĉe la Universidad Complutense de Madrid. <http://eprints.ucm.es/tesis/19911996/S/3/S3014301.pdf>

La internacia traktatoj pri ĉi tiu temo, tio estas: la lingva diverseco, pravigas ĉi tiun bazan formuladon, ĉar oni konsideras ĉiam la apartenon al grupoj parolantaj minoritatan lingvon el la vidpunkto de la garantio de la egaleco ka la forigo de la diskriminacio. Tutcerte, la aniĝo al tiuj grupoj povas esti unu el la plej klaraj situacioj kie oni povas malobservi la principon pri egaleco, pro tio estas tute malpermesite diskriminacii pro lingvaj aferoj, krom aliaj personaj aŭ sociaj cirkonstancoj.

Sciante, ke la artikolo 14-a de la Eŭropa Kunveno pri Protektado de Fundamentaj Rajtoj kaj Publikaj Liberecoj (Romo 1950) ordonas, ke la ĝuo de la rajtoj kaj liberecoj agnoskitaj en tiu kunveno ... *devas esti sendistinge certigita, speciale pri aferoj rilataj al ĝenro, haŭt-koloro, lingvo, religio, politikaj aŭ aliaj kredoj, nacia aŭ socia origino, aparteno al nacia minoritato, riĉeco, naskiĝ-loko aŭ kia ajn alia situacio.*

Tamen, ĉi tiu problemo prezentas novan dimension, pro la nuntempa migrada fenomeno, kaj ĉefe pro la cirkonstancoj en kiuj ĝi okazas, tute proksimaj al marĝenado. Vere, en tiaj cirkonstancoj, la uzo de minoritata lingvo povas esti la bazo de diskriminacio, ne pro la prefero de unu aŭ alia lingvo, sed ĉefe pro la fakto, ke la migrantoj ne konas, aŭ malbone regas, la lingvon de la ŝtato kien ili migris.

Rilate la principon de egaleco kaj forigo de la diskriminacio, la protektado de la lingvaj minoritatoj havas gravajn limojn, ĉar el la jura vidpunkto, la principo pri egaleco ne postulas apliki identan traktadon al ĉiuj grupoj, sendepende de la lingvo uzata. Kontraŭe oni povas apliki malsimilan reguladon al homaj grupoj konsiderante la lingvon parolata de ili. Tiel, en la internacia jurisprudenca vidpunkto, estas eble apliki malsimilan traktadon, kondiĉe ke tiu malsimileco ne baziĝu sur diskriminaciaj aferoj. Tiel, la principo pri egaleco kaj forigo de la diskriminacio estas negativa limo por la publika potenco, ĉar oni celas eviti diskriminaciigajn traktadojn kaj oni ne povas, surbaze de tiuj principoj, realigi pozitivajn agadojn por favorigi la lingvan diversecon de tiuj grupoj.

Ekzemple, ĉe socio ĝuanta perfektan du-lingvismon, tio estas kiam la tuta civitanaro kapablas regi ambaŭ lingvojn, la principo pri egaleco kaj forigo de la diskriminacio, komprenata laŭ la internacijura jurisprudenco, estas tute garantiata por la membroj de ĉiuj grupoj, se oni uzas unu aŭ alian lingvon. Tamen, ĉe tiuj socioj kie ne ekzistas perfekta du-lingvismo, la problemo akriĝas, ĉar la membroj de la grupo parolanta la minoritatan lingvon, aŭ eĉ tiuj parolantaj lingvon minoritata en la ŝtato, sed ja majoritata en tiu parto de la ŝtato, povas peti aktivajn agadojn de la politika potenco por garantii la ne-diskriminacion de la lingvo aŭ eĉ por garantii la rajton uzi sian propran lingvon en la rilatoj kun la publika administracio aŭ dum la instruado.

Tiel, en multaj ŝtatoj la protektado de la grupoj parolantaj minoritatajn lingvojn devenis en ne simpla forigo de la diskriminacio, sed ja oni adoptis pozitivan protektadon de tiuj grupoj, kaj foje eĉ oni konsideris kiel lingvon oficialan en tiu parto de la ŝtato tiun minoritatan lingvon. Ekzemple, la kastilia lingvo estas oficiala en la tuta hispana ŝtato, sed ja estas kun-oficiala en Galegio, Basklando, Katalunio, Valenci-lando, Baleara Insularo kaj Navaro, kie ankaŭ estas oficialaj, aŭ pli bone diri kun-oficialaj, la galega, la baska, la kataluna, la valenci-kataluna, la kataluna kaj la baska lingvo, respektive. Eĉ krome, en Katalunio estas ankaŭ kun-oficiala idioma la lingvo de la Arana Valo, ĉe tiu zono.

Sed, nova afero povas malfaciligi ĉi situacion, ĉar verŝajne la lingvo povas esti prezentanta ne nur el la komunika vid-punkto, sed ankaŭ kiel rimedo por realigi politikajn projektojn. Tio okazas kiam la uzo de malsimilaj lingvoj ne devenas el la malkono, aŭ ne tre bona regado, de unu lingvo fare de membroj de konkreta grupo, sed ja pri la uzo de lingvo apartenanta al minoritato kiu celas uzi ĝin por certigi sian identecon, eĉ sian nacian identecon. Kiel asertas Alessandro PIZZORUSSO², la principo pri egaleco kaj forigo de la diskriminacio, el la internaci-jura vidpunkto, estas ege utila por eviti la diskriminacion de minoritatoj, ĉar oni faciligas ĝian integradon en la majoritaton, tamen

² PIZZORUSSO, Alessandro, *Commentario della Costituzione. Principi fondamentali. Artt. 1-12*, Zanichelli-Foro Italiano. Bologna-Roma, 1975.

ne estas taŭga se temas pri tiuj minoritatoj dezirantaj plivalorigi siajn partikularajn karakterojn. PIZZORUSO uzas por ambaŭ minoritatoj malsimilajn nomojn, tiel, li parolas pri “*necesa aŭ ne-volanta minoritato*” okaze de la unua ekzemplo, kaj “*volanta minoritato*” tiu dua.

Ĉi-kaze, la protektado de la minoritataj lingvoj fare de la internacia juro estas tute ne-valida, aŭ pli bone dirite, ĝi estas tute valida, sed ja pere de ne-tipa afero, ĉar oni devas protekti la membrojn de grupo parolanta la majoritatan lingvon, se oni konsideras ĝin kiel lingvon parolata de la plimulto en tiu ŝtato, sed ne ĉe tiu parto de la ŝtato. Tiuj limoj garantiataj de la principo de egaleco kaj forigo de la diskriminacio devas esti aplikataj, sed ĉi-kaze inverse, por eviti la diskriminacion de la plimulto, konsiderata ŝtat-nivele, sed minoritato se oni kalkulas nur tiun parton de la ŝtato.

II. LA LINGVA REĜIMO EN HISPANIO. LA KUN-OFICIALECO

Ne estas tempo nun prezenti detalan raporton pri la lingva historio de Hispanio, tamen oni devas elstarigi la fakton, ke post la civitana milito (1936-1939) la uzo de lingvoj ne-kastiliaj, tio estas: la kataluna, la galega aŭ la baska, estis ĉu malpermesita, ĉu limigitaj al kelkaj zonoj, ĉefe kamparaj, eble pro tio ne uzi la kastilian lingvon esti simila al ne posedi sufiĉajn kulturajn konojn.

Okaze de la lastaj jaroj de la frankisma reĝimo, la tiel nomata *tardofranquismo*, oni duon-permesis la uzon de tiuj lingvoj, sed oni ne ĝeneraligis ĝian uzon. Kiam la generalo Franco mortis aperis, aŭ re-aperis, naciismaj movadoj ĉe kelkaj zonoj de la hispana ŝtato, ĉefe en Katalunio kaj Basklando. Tiuj naciismoj emis favorigi la uzon, eĉ el oficialaj instancoj, de ne-kastiliaj lingvoj. Kiam oni aprobis la demokratian Konstitucion en la jaro 1978, oni proklamis la oficialecon de la kastilia lingvo en la tuta ŝtato, sed oni akceptis la ekziston, eĉ la

kun-oficialecon, de aliaj lingvoj en la zonoj kie ili estas uzataj. Tiel, la artikolo 3-a de la Konstitucio proklamas:

1. *La kastilia estas la hispana lingvo oficiala en la Ŝtato. Ĉiuj hispanoj havas la devon koni ĝin kaj la rajton uzi ĝin.*
2. *La ceteraj hispanaj lingvoj estos ankaŭ oficialaj en la respektivaj Aŭtonomaj Komunumoj akorde al iliaj Statutoj.*
3. *La riĉeco de la malsimilaj lingvaj modeloj en Hispanio estas kultura havaĵo kiun oni devas respekti kaj protekti.*

Komenciĝis tiam la nova strukturo de Hispanio, surbaze de la ekzisto de aŭtonomaj komunumoj, pli malpli similaj al la germanaj *Lander*. Ĉiu aŭtonoma komunumo reguligas sian propran ekziston pere de aŭtonoma statuto, kiu estas komprenata kiel parto de la konstitucia leĝaro de Hispanio. Ekzistas komunumoj kie nur estas uzata la kastilia lingvo: Andaluzio, Ekstremaduro, Kastilio, Kantabrio, Kanaria Insularo, Murcio... do, la statutoj de ĉi tiuj komunumoj mencias nenion pri lingvaj aferoj; tamen aliaj komunumoj kun propraj lingvoj, elstaras la kun-oficialecon de siaj lingvoj.

Tiel, la statuto de Galegio de la jaro 1981 proklamas:

Artikolo 5.

1. *La lingvo propra de Galegio estas la galega lingvo.*
2. *La lingvoj galega kaj kastilia estas oficialaj en Galegio kaj ĉiuj rajtas koni kaj uzi ilin.*
3. *La publikaj potencoj de Galegio garantios la normalan uzon de ambaŭ lingvoj kaj favorigos la uzon de la galega lingvo en la publika, kultura kaj informa vivo, oni metos la necesajn rimedojn por faciligi ĝian konon.*
4. *Neniu povas esti diskriminaciita pro lingvaj aferoj.*

Sur la Statuto de Basklando de la jaro 1979 oni legas:

1. *La eŭska, propra lingvo de la Baska Popolo, kiel la kastilia lingvo estas oficiala en Basklando, kaj ĉiuj enloĝantoj rajtas koni kaj uzi ambaŭ lingvojn.*

En la jaro 1982 la Statuto de Valencio lando diras:

Artikolo 6.

1. *La propra lingvo de la Valencio Komunumo estas la valencio.*
2. *La valencio lingvo estas oficiala en la Valencio Komunumo, same kiel la kastilia, kiu estas la oficiala lingvo de la Ŝtato. Ĉiuj rajtas koni kaj uzi ilin kaj ricevi instruadon pri, kaj en, la valencio lingvo.*

En la jaro 1983, sur la Statuto de la Baleara Insularo aperas:

Artikolo 4. La propra lingvo.

1. *La kataluna lingvo, propra de la Baleara Insularo, estos, kune kun la kastilia, la oficiala idiomo.*
2. *Ĉiuj rajtas koni kaj uzi ĝin kaj neniu povos esti diskriminaciita pro la lingvo.*

En Navaro sur la Statuto de la jaro 1982 oni proklamas:

Artikolo 9.

1. *La kastilia estas la oficiala lingvo de Navaro.*
2. *La baska lingvo ankaŭ estos oficiala lingvo ĉe tiuj basko-parolantaj zonoj de Navaro.*
3. *Navara leĝo fiksos tiujn zonojn, reguligos la oficialan uzon de la baska lingvo kaj, akorde al la ŝtata leĝaro, reguligos la instruadon de tiu lingvo.*

Kaj fine, la kataluna konsidero de la lingvoj sur du statutoj, tiu aprobita en la jaro 1979 kaj tiu de 2008. La unua de 1979 diras:

Artikolo 3.

1. *La lingvo propra de Katalunio estas la kataluna.*
2. *La kataluna lingvo estas oficiala en Katalunio, kaj ankaŭ la kastilia, oficiala en la tuta hispana Ŝtato.*
3. *La Kataluna Registaro garantias la normalan kaj oficialan uzadon de ambaŭ lingvoj, ĝi adoptos la necesajn rimedojn por garantii ilian konon kaj ĝi kreos la kondiĉojn necesajn por atingi*

la plenan egalecon rilate la lingvojn kaj devojn de la katalunaj civitanoj.

4. *La parol-maniero de la Arana Valo estos pristudinda afero kaj ĝi meritas respekton kaj protektadon.*

Kaj la Statuto de la jaro de la jaro 2006, valida nuntempe, proklamas rilate la lingvojn:

Artikolo 6. La Propra lingvo kaj la oficialaj lingvoj

1. *La lingvo propra de Katalunio estas la kataluna. Tiel, la kataluna estas la normala kaj prefera lingvo ĉe la Publikaj Administracioj kaj ĉe la publikaj amas-medioj de Katalunio, ĝi ankaŭ estas la normala lingvo ĉe la instruado.*
2. *La kataluna estas la oficiala lingvo de Katalunio. Ankaŭ la hispana, kiu estas la oficiala lingvo de la hispana Ŝtato. Ĉiuj rajtas uzi ambaŭ oficialajn lingvojn kaj la katalunajn civitanojn rajtas kaj devas koni ilin. La publikaj potencoj de Katalunio adoptos la necesajn rimedojn por faciligi la realigadon de ĉi tiuj rajtoj kaj la plenumado de tiu devo. Akorde kun la artikolo 32, ne povas ekzisti diskriminacio pro la uzo de unu aŭ alia lingvo.*
3. *La Kataluna Registaro kaj tiu Hispana devas ekigi la necesajn agadojn cele la agnoskon de la oficialeco de la kataluna lingvo ĉe la Eŭropa Unuiĝo kaj la ĉeesto kaj uzado de la kataluna ĉe internaciaj organizoj kaj traktatoj pri kulturaj aŭ lingvaj temoj.*
4. *La Kataluna Registaro devas promocii la komunikadon kaj kooperadon kun la ceteraj komunumoj kaj teritorioj kiuj posedas saman lingvan enhavaĵon ol Katalunio. Pro tio, la Kataluna Registaro kaj la Hispana, laŭkaze, povas subskribi kunvenojn, traktatojn aŭ aliajn kunlaboralilojn por promocii kaj disvastigi ekstere la katalunan lingvon*
5. *La okcitana lingvo, nomita arana lingvo ĉe la Arana Valo, estas la lingvo propra de ĉi tiu teritorio kaj ĝi esas oficiala en Katalunio, akorde al la disponoj de ĉi tiu Statuto kaj la leĝoj pri lingva normaligo.*

Kiel vidite, la oficiala karaktero de la lingvoj propraj de la aŭtonomaj komunumoj signifas, ke ili estas oficialaj sendepende de la uzo, ofta aŭ malofta, fare de la civitanaro, ĉar ĝi estas agnoskata de la

publikaj aŭtoritatoj kiel normala komunikilo en tiu komunumo, do ĝi estas tute valida kaj plena je juraj efektoj. Pro la fakto, ke ezistas du kun-oficialaj lingvoj sur sama teritorio, la deklaro de la kun-oficialeco de ambaŭ idiomoj signifas, ke la uzo de unu aŭ alia lingvo, ĉu de la civitanaro ĉu de la publikaj aŭtoritatoj, posedas egalan validecon, kvankam la ebleco uzi nur unu el tiuj lingvoj, anstataŭ ambaŭ samfoje, dependas de la rajtoj agnoskitaj de la Konstitucio kaj de Aŭtonomaj Statutoj mem, aŭ de la posta leĝaro. Tiel, la leĝoj mem disponas ĉu la civitano rajtas elekti la uzatan lingvon kiam oni rilatas kun la administracio, kompreneble tio okazas nur ĉe tiuj komunumoj kun propra kun-oficiala lingvo, sur la cetera ŝtato la lingvo elektata devas esti ĉiam la kastilia.

Laŭ vidite, la propra Hispana Konstitucio proklamas jenon:

- La oficialan karakteron de la hispana lingvo sur la tuta teritorio.
- La devon koni ĝin.
- La oficialan karakteron de la lingvoj propraj de la aŭtonomaj komunumoj en iliaj respektivaj teritorioj.

Tamen, la ekzakta jura reĝimo de ĉi tiuj lingvoj devas esti difinitaj sur la respektivaj statutoj de tiuj komunumoj, tiel la politikaj reprezentantoj de tiuj komunumoj en la momento redakti kaj aprobi la aŭtonomajn ĉef-leĝojn respondeciĝas pri la jura reĝimo de la respektivaj lingvoj de tiuj komunumoj. Ne temas pri afero aprobota de la nacia hispana parlamento, registaro aŭ de la reprezentantoj de la hispana ŝtato, tute kontraŭe, tio apartenas nur al la politikaj reprezentantoj de la propraj komunumoj, do al la civitanoj mem de la aŭtonomaj komunumoj, ĉar la hispana konstitucio nur mencias la kun-oficialecon de la lingvoj en la komunumoj kiuj disponas pri propra lingvo, sed tute ne la lingvan reĝimon pri la uzo de tiuj lingvoj.

Siafoje, la hispana konstitucio ja mencias ne nur la oficialecon de la kastilia lingvo en la tuta ŝtato, sed ankaŭ disponas la juran reĝimon de tiu lingvo en la tuta lando, pere de la frazo *ĉiuj devas koni ĝin*. Do, temas pri devo, ne nur pri rajto rilate la uzadon.

Rilate la devon koni la kastilian lingvon, la Konstitucia Kortumo deklaris, ke tiu normo reale signifas, ke la argumento pri la “ne-kono” de la kastilia lingvo ne posedas jurajn efektojn. Kontraŭe, sur la statutoj de la aŭtonomaj komunumoj tiu *devo* koni la propran lingvon ne ekzistas, ĝi estas kun-oficiala sed tute oni ne devigas lerni ĝin. Ekzemple, la baska statuto diras ...*ĉiuj enloĝantoj rajtas koni kaj uzi ambaŭ lingvojn*. Tio estas, nur ekzistas rajto koni kaj uzi, sed ne devo koni la lingvon, kiel ja okazas ĉe la Hispana Konstitucio ... *ĉiuj hispanoj havas la devon koni ĝin kaj la rajton uzi ĝin*.

Tamen, la nova kataluna statuto de la jaro 2006, anstataŭiganta tiun de 1978, proklamas jenon: *ĉiuj rajtas uzi ambaŭ oficialajn lingvojn kaj la katalunaj civitanoj rajtas kaj devas koni ilin*. Tamen oni povas demandi ĉu similas la esprimoj “*devas koni*” (kataluna statuto rilate hispanan kaj katalunan lingvojn) kaj “*havas la devon koni*” (hispana konstitucio rilate la kastilian lingvon). Mi pensas, ke tute ne egalas ambaŭ esprimoj.

Eblas pensi, ke tiu rajto, sed ne devo, koni la lingvojn de la aŭtonomaj komunumoj, devenas de la socio-lingvistika realo de kelkaj aŭtonomaj komunumoj, kiuj tute ne povas devigi tiun konon, ĉar foje la propra lingvo ne estas amase konata, parolata aŭ uzata sur la tuta aŭtonoma teritorio. Do, la devo koni la lingvon ekzistas nur rilate la kastilian sur la tuta teritorio, sed ne pri la aŭtonomaj lingvoj sur la teritorio de tiu komunumo.

La Konstitucia Kortumo, kiam ĝi pritraktis la ĝeneralan devon koni la kastilian lingvon, inverse proklamis la ne-devon koni la aŭtonomajn lingvojn. Tiel okaze de la juĝo 84/1986, pritraktanta la leĝon pri la galega lingvo, kun-oficiala ĉe la aŭtonoma komunumo Galegio, proklamis, ke la konstitucia devo koni la kastilian lingvon, kontraŭsence signifas, ke oni ne povas enirigi novan devon, ĉi-kaze koni la galegan lingvon fare de la galega civitanaro. La Kortumo diris ... *oni povas supozi, ke sendepende de la loko kie oni loĝas, ekzistas la devo koni la kastilian lingvon, tamen tio ne okazas rilate aliajn kun-oficialajn lingvojn sur la respektivaj teritorioj*. Tio povas esti prava aŭ ne, ĉefe pro la socio-lingvistika realo de la tuta ŝtato, kie la tuta

civitanaro konas la kastilian lingvon, sed ne ĉiuj enloĝantoj de la aŭtonomaj komunumoj konas perfekte, aŭ eĉ sufiĉe bone, la lingvon de tiu komunumo. Do, neniuj publika aŭtoritato rajtas peti la uzon de lingvo kiu ne estas perfekte regata de la tuta civitanaro.

Tamen, tio povas esti komprenata el alia vidpunkto, tiel okaze de la kun-ekzisto de du oficialaj lingvoj sur konkreta teritorio, la civitanaro, kaj ne la publikaj potencoj, rajtas elekti la lingvon uzeblan okaze de la rilatoj civitanaro-aŭtoritatuloj. Tiu rajto ne apartenas al la publikaj aŭtoritatoj, sed ja al la civitanaro mem³, do oni povas, sur tiuj aŭtonomaj teritorioj, elekti la lingvon uzeblan. Okaze de la rilatoj aŭtoritatoj-civitanaro la lingvo uzata estas tiu kiun elektis la civitano, kaj ne nepre la aŭtonoma lingvo, ĉar verŝajne la civitano ne sufiĉe bone regas la aŭtonoman lingvon, sed ja la ŝtata, tio estas la kastilia.

Kiel jam dirite, la aŭtonoma statuto, aŭ la leĝaro aprobata post ĝi, estas la normo, aŭ normaro, kiu devas decidi la juran reĝimon de la lingvo propra de tiu komunumo, kiel lingvo oficiala, kaj tiu tasko apartenas al la civitanaro de tiu komunumo, aŭ pli precize al ĝiaj reprezentantoj. La limo nur estas la konstitucia devo koni la kastilian lingvon, kio ja devas esti garantiata. Tiu garantio provokas, inter aliaj aferoj, ke oni devas instrui ĝin en la lernejo, kompreneble apud la aŭtonoma lingvo, eĉ se konkreta familio rifuzas la instruon de la kastilia lingvo al sia idaro. Pri ĉi tiu temo fine, oni devas diri, ke la aŭtonomaj komunumoj rajtas doni la karakteron pri “deviga lingvo” ankaŭ al siaj lingvoj, kvankam ĝis nun neniuj faris tion ene de la respektivaj statutoj, kiel dirite, verŝajne la lasta kataluna statuto, tiu de la jaro 2006, iom alproksimiĝas al la devigo koni la katalunan, tamen eblas pensi, kiel oni jam diris, ke ekzistas diferenco inter “devas koni ĝin” kaj “havas la devon koni ĝin”. Tiel, la Konstitucia Kortumo jam proklamis kelfoje, ke la devo koni la kastilian lingvon estas nepre, laŭ

³ Tamen, la juĝo de la Konstitucia Kortumo 337/1994 pri la lingva normaligo en Katalunio, devigas uzi la katalunan lingvon kiel ĉefan idiomon dum la instruado en tiu lando, do, ĉi-kaze la civitano ne rajtas elekti la lingvon uzotan en siaj rilatoj kun la Administracio, ĉi-foje rilate la instruadon. La Kataluna Aŭtonoma Statuto de la jaro 2006 proklamas la devon uzi la katalunan lingvon dum la instruado.

aserto de la artikolo 3.1 de la Konstitucio mem, tamen tiu karaktero ankaŭ povas aparteni al la aŭtonomaj lingvoj, nur kondiĉe ke tio aperu sur la propraj aŭtonomaj statutoj. Do, temas nur pri-noma diskuto, ĉar la aŭtonomaj statutoj, escepte de la lasta de Katalunio, proklamas la kun-oficialecon de la lingvoj nur rilate la rajton elekti lingvon fare de la civitanaro, neniel rilate la devon koni ambaŭ lingvojn.

III. LEĜA KAJ SOCIO-LINGVISTIKA SITUACIOJ

Estas necese pristudi la lingvistikan realon de socio, kaj tiel scii, ĉu la jura situacio estas adekvata aŭ ne al la realaĵo. Verdire, la jura valideco de la aktoj realigitaj pere de la kun-oficiala lingvo de teritorio, ne dependas de la amasa kono de la lingvo fare de la civitanaro de tiu teritorio. La Konstitucia Kortumo mem jam deklaris, ke tiuj juraj efektoj okazas *sendepende de la graveco de tiu lingvo kiel socia fenomeno en la teritorio*. Tamen, ankaŭ indas konsideri la socian gravecon de la lingvo en tiu komunumo.

Unualoke, estus malfacile pensi, ke oni povus leĝi pri la devo “koni” la aŭtonoman lingvon, se tiu lingvo ne estas sufiĉe disvastigita kaj plene akceptita de la tuta civitanaro. Tiel, ĉe kelkaj komunumoj, specife Navaro kaj Valenci-lando, la disvastigo aŭ la manko de disvastigo de la komunuma lingvo, determinas la juran konsideron de la lingvo en tiuj komunumoj laŭ konkreta zono⁴. En aliaj kazoj, ekzemple Basklando, oni preferis deklari la kun-oficialecon de la baska lingvo sur la tuta teritorio, malgraŭ la fakto, ke ĝi estis apenaŭ konata sur konkretaj zonoj de la komunumo.

Tiel, laŭ juĝo de la Konstitucia Kortumo de la jaro 1986, la adopto de lingvo kiel kun-oficiala ĉe aŭtonoma komunumo devigas al la publikaj

⁴ Laŭ la aŭtonomaj statutoj de Navaro kaj Valenci-lando la oficialeco de la baska kaj la valencia lingvo havas teritoriajn karakterojn, pro la fakto, ke la enirigo de ambaŭ lingvoj en la eduk-sistemo kaj en la rilatoj “civitanaro-administracio” dependas de la uzo de la lingvo sur tiu konkreta zono.

potencoj garantii la kompletan validecon de la juraj aktoj plenumitaj surbaze de tiu lingvo, kaj tio igas necesa la alprenon de la lingvo fare de la administracio, de la rimedoj por faciligi la rajton de la civitanaro uzi tiun kun-oficialan lingvon okaze de ĝiaj rilatoj kun la administracio, ĉu ŝtata, ĉu aŭtonom-komunuma, ĉu urba. Kaj ĉi ĉio malgraŭ la fakto, ke la Administracio povas trovi malfacilaĵojn por adapti sian strukturon al tiu dulingva realaĵo. Ekzemple, laŭ decido de la Konstitucia Kortumo, estas necese plivalorigi la konon de la komunuma lingvo okaze de ekzamenoj aŭ pruvoj celantaj elekti funkciulojn en tiu komunumo, tiel oni konsideras meriton la konon de la komunuma lingvo okaze de ekzamenoj por labori kiel instruisto, kuracisto, publika oficisto, ktp.

Eble tio povas esti konsiderata kiel diskriminacio kontraŭ kandidatoj al tiu postenoj de aliaj partoj de la ŝtato, do ne-konantaj la aŭtonoman lingvon. Ekzemple, andaluza kuracisto ne povas esti kandidato por labori en Katalunio, pro la fakto, ke en Andaluzio oni ne parolas la katalunan lingvon; tamen inverse, kataluna kuracisto ja povas labori en Andaluzio, ĉar tie oni parolas nur la kastilian, lingvo kies kono estas deviga por kataluno kaj ankaŭ por andaluzo. Tamen, la Konstitucia Kortumo deklaris, ke oni ne povas kompreni tion kiel diskriminacion, pro la fakto, ke la kun-oficialeco de la komunuma lingvo en tiu parto de la hispana ŝtato, igas, ke ĝia kono estas merito por la kandidatoj labori ĉe la Administracio, kvankam reale, tiu pozicio ne povas esti absoluta, ĉar la propra Kortumo proklamis, ke por tiuj postenoj en kies realigado ne estas necesa la kontakto kun la civitanaro, ja oni povas nuligi la meriton koni la kun-oficialan lingvon, favore aliajn kondiĉojn.

Do, estas necese koni la konkretajn socio-lingvistikajn situaciojn de la aŭtonoma komunumo, por konsideri ĉu la neceso koni la lingvon povas esti diskriminacio aŭ ne, ĉar la deklaro de lingvo kiel kun-oficiala ne povas pravigi kian ajn agadon de la publikaj potencoj favore al la kono de tiu lingvo kaj sen rilato kun la lingva realo de la civitanaro.

Resume, estas necese elstari la gravecon de la laboro kaj la decidoj prenitaj de la konstituciantaj politikistoj en Hispanio en la jaro 1978. Tiuj lingvoj kiuj estis konsideritaj, ĉu kiel danĝeraj por la unuiĝo de la propra ŝtato, ĉu kiel karakterizaĵo de ne-instruitaj homoj, komprenis, ke tio grava estas la homo mem kaj la lingvo estas nur esprimilo aŭ kulturilo de popolo. Unuafoje en la historio de Hispanio suprenirigis la lingvojn ne-kastiliajn je la nivelo konsideri ilin kun-oficialaj en la respektivaj teritorioj, kaj tio sendube estas bonega ne nur por la civitanaro, kiu rajtas esprimiĝi laŭ sia libera elekto, sed tamen por la kultura vivo de la lingvo kiu estas prizorgata de la aŭtonomaj registaroj. Espereble, la lingvo estos neniam ilo por distancigi la personojn sed kontraŭe, instrumento por alproksimigi ĉiujn, tion ni, la esperantistaro, komprenas perfekte.

INTERNACIA ADOPTO KAJ LA RAJTO JE LA PRIVATA KAJ FAMILIA VIVO.

Juĝo de la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj de la 3-a de majo 2011-a (Kazo: Négrépontis-Gianninis kontraŭ Grekio)

La juĝo de la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj de la 3-a de majo 2011-a (kazo: Négrépontis-Gianninis *kontraŭ* Grekio), solvas apelacion prezentita de greka naciانو, S-ro Nikolaos NÉGRÉPONTIS-GIANNINIS, kontraŭ la Greka Respubliko, pro la malobservo de lia rajto ĝui familian kaj privatan vivon, afero garantiata de la artikolo 8-a de la Konvencio pri la Protektado de la Homaj Rajtoj kaj la Fundamentaj Liberecoj.

ORIGINO DE LA JUĜ-AFERO

La deir-punkto de ĉi tiu proceso troviĝas en la adopto de la apelacianto fare de lia onklo, Michail-Thimothéos NÉGRÉPONTIS, frato de lia patrino kaj Episkopo de la Ortodoksa Greka Eklezio. Ambaŭ tenadis korinklinajn familiajn rilatojn ekde la infa-aĝo de la apelacianto. La adopto realiĝis en Detroito (Miĉigano) la 24-an de julio 1984-a, akorde al la usona leĝaro. En la momento aprobi la adopton, la adoptinto kaj la adoptito estis 60 kaj 20-jaraĝa respektive. Ambaŭ loĝis en la usona urbo Detroito, kie la adoptito sekvis universitatan karieron kaj la adoptanto estis Episkopo de la Ortodoksa Greka Eklezio.

En la momento subskribi la adoptan akordon, la S-ro Michail-Thimothéos NÉGRÉPONTIS sciigis sian deziron adopti sian nevon kaj tiel havi legitiman idon kapabla heredi sian gravan kolekton de manuskriptoj pri antikvaj religiaj tekstoj, aliajn posedaĵojn kaj ankaŭ por daŭrigi sian familian nomon. Siafoje, la adoptito esprimis sian deziron fortigi la familiajn ligojn inter ambaŭ, krome li deziris vivi kaj prizorgi la adoptanton dum lia maljun-aĝo.

Okaze de la adopto, la adoptito ŝanĝis sian familian nomon, kaj tiel apud la familia nomo de sia biologia patro (*Gianninis*) li aldonis la familian nomon de la adoptanto (*Négrépontis*). Post la adopto ambaŭ daŭrigis sian kunvivadon en Usono kaj poste en Grekio, ĝis la morto de la Episkopo NÉGRÉPONTIS en Ateno en la jaro 1998.

Post la morto de la S-ro NÉGRÉPONTIS, unu el liaj fratinoj prezentis ĉe greka kortumo, peton por esti deklarata, kune kun la aliaj tri gefratoj, heredantoj de la Episkopo. La kortumo akceptis la peton sur la bazo, ke la Episkopo ne havis idaron. Samtempe, la adoptito prezentis peton ĉe greka kortumo cele la agnoskon de la adopta proceso plenumita en Usono. La Kortumo de Ateno, pere de juĝo de la 24-a de decembro 1999-a, akceptis la peton pri la agnosko de la adopto. Poste, la S-ro NÉGRÉPONTIS-GIANNINIS ekigis proceson pri nom-ŝanĝo, cele la antaŭenirigon de la familia nomo de la adoptinto, anstataŭ tiu de la biologia patro. Li atingis la aprobon de tiu ŝanĝ-nomo la 4-a de aŭgusto 2001-a.

Ankaŭ en la jaro 2001-a unu el la fratinoj de la Episkopo apelaciis ĉe la Atena Kortumo, kun la peto rifuzi la agnoskon de la valideco de la adopto plenumita eksterlande, pro la fakto, ke la adoptanto ne rajtis havi legitiman idaron, ĉar li estis monaĥo. Do, la solaj heredontoj estus la gefratoj de la Episkopo. Antaŭe la S-ro NÉGRÉPONTIS-GIANNINIS petis la nuligon de la deklaro kiel heredontoj favore al la gepratoj de la adoptanto, li ankaŭ petis esti nomumita kiel sola heredanto. La Kortumo decidis haltigi tiun proceson, ĝis kiam oni decidis pri la proceso ekigita de la fratino NÉGRÉPONTIS rilate la nuligon de la adopto eksterlande realigita.

Fine, la Kortumo de Ateno pravigis la apelaciantinon, ĉar la adopto estis tute kontraŭa al la monaĥa viv-stato de la adoptanto, kio estas tute kontraŭa al la principoj de la greka leĝaro. S-ro NÉGRÉPONTIS-GIANNINIS apelaciis ĉe la Suprema Kortumo de Grekio, li konsideris, ke oni malobservis la artikolon 8-an de la Konvencio pri la Protektado de la Homaj Rajtoj kaj la Fundamentaj

Liberecoj. La juĝo de tiu Kortumo decidis rifuzi la apelacion, pro la fakto, ke adopto plenumita de monaĥo estis tute kontraŭa al la grekaj normoj, kvankam la juĝo ne estis unuanima, 16 juĝistoj voĉdonis favore al la rifuzo de la apelacio, 8 voĉdonis kontraŭe.

ENHAVO DE LA JUĜO DE LA SUPREMA GREKA KORTUMO

Kiel dirite, la Suprema Greka Kortumo juĝis, ke la adopto realigita en Usono estis kontraŭa al la greka leĝaro, ĉar laŭ la ekleziaj normoj de la Ortodoksa Greka Eklezio, la monaĥoj rajtis nek adopti, nek dediĉi sin al aferoj fore de la vivo de tiu Eklezio, laŭ la artikolo 33-a de la Civila Kodo de Grekio. Konsekvence, la Suprema Greka Kortumo ne povis agnoski la validecon de tiu adopto realigita eksterlande.

Tamen, 8 el la 24 juĝistoj ne subtenis tiun decidon. Laŭ ĉi tiuj juĝistoj ne ekzistis leĝo malpermesanta adopton fare de membro de la Ortodoksa Eklezio, ĉu pastro, ĉu monaĥo, ĉu eĉ episkopo. Pro tio, la adopto devus esti agnoskata kiel tute valida. Samtempe, oni diris, ke familia rilato kiu ĉefe disvolviĝis sur eksterlanda ŝtato neniel povus damni la fundamentajn valorojn de la greka ŝtato.

Laste, rilate aferojn intime rilataj al la privata vivo de la persono, la 8 juĝistoj diris, ke oni devus preni en konsideron ne nur la artikolon 8-a de la Konvencio, sed ankaŭ la artikolojn 5-an kaj 13-an de la propra Greka Konstitucio, ŝtato kiu, malgraŭ la oficiala agnosko de la Ortodoksa Eklezio kiel la plej grava en la lando, proklamas ankaŭ la liberan disvolviĝon de ĉiu persono akorde al lia konsciencia kaj religia liberecoj.

JURAJ FUNDAMENTOJ DE LA APELACIO ĈE LA EŬROPA KORTUMO PRI HOMAJ RAJTOJ

S-ro NÉGRÉPONTIS GIANNINIS en sia apelacio ĉe la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj, kontraŭ la juĝo de la Greka Suprema

Kortumo, argumentis, ke oni perfortis lian rajton ĝui familian kaj privatan vivon, ĉar la juraj ligoj ekzistantaj post la adopto inter la adoptanta patro kaj li mem, estis tiel fortaj, ke ili meritis la protektadon de la artikolo 8-a de la Konvencio. Krome, li parolis pri sia rajto heredi el la adoptanto kaj pri la damno provokita de la greka kortumo, ĉar oni nuligis la validecon de la adopta proceso realigita en Usono kaj tio supozis la nuligo de lia *status filii*, do, esti konsiderata kiel filo de la adoptinto, oni interrompiĝis tiam 24 jaroj da uzo de la familia nomo de la adoptanto, uzita okaze de liaj sociaj kaj profesiaj rilatoj, kaj ankaŭ uzita siafoje de liaj propraj filoj.

Alie, laŭ la apelacianto, oni malobservis la artikolon 14-an de la Konvencio, pro la fakto, ke kontraŭleĝe oni diskriminaciis lin pro la ekzisto de familia ligo devenanta ne el la biologio sed ja el adopt-proceso. Li argumentis, ke se li estus biologia filo de la Episkopo NÉGRÉPONTIS la Greka Kortumo ne povus malobservi tiun realon, eĉ se la monaĥoj ne povus havi legitiman idaron. S-ro NÉGRÉPONTIS-GIANNINIS ankaŭ konsideris, ke ekzistis malobservo de la artikolo 6-a de la Konvencio, ĉar la greka kortumo ne akceptis la validecon de jura usona decido, kaj tio estis atako al lia rajto havi justan proceson, kiel estis la tiutempa jura usona decido.

Rilate la heredajn havaĵojn de la apelacianto, li diris, ke li ne povis ĝui tiun patrimonion kaj tio ankaŭ estis atako al la rajto posedi kviete la hereditajn havaĵojn pri kiuj li sendube rajtis kiel heredanto de sia adoptanta patro. Konkrete, li ne povis ĝui ne-moveblaĵojn de la Episkopo NÉGRÉPONTIS en la insulo Paros.

KONTRAŬAJ ARGUMENTOJ DE LA GREKA REGISTARO

Unue, la greka registaro bazis sian defendon sur la fakto, ke la apelacianto ne elĉerpis la apelaci-eblecojn antaŭviditaj de la greka leĝaro. Tiel, la grekaj kortumoj ne povis studi sufiĉe la aferon. Rilate la usonan juron pri la adopto, la greka registaro argumentis, ke oni ne pruvis sufiĉe la familiajn rilatojn, tiel abundaj laŭ la apelacianto, inter

adoptinto kaj adoptito, kaj pro tio oni ne povis scii, ĉu la familiaj rilatoj verdire estis la kaŭzoj de la adopto.

Krome, laŭ la greka respondo al la apelacio, la ceteraj familianoj de la Episkopo NÉGRÉPONTIS, tio estas la gefratoj, dum multaj jaroj esperis leĝe esti la heredontoj de sia frato ĉar ili neniam ricevis informojn de la Episkopo rilate la adopton favore al lia nevo. Verdire, dum 24 jaroj nek la adoptanto, nek la adoptito prezentis peton ĉe la grekaj kortumoj por validigi en Grekio la adopton realigita en Usono, malgraŭ la fakto, ke ili loĝis dum kelkaj jaroj en tiu lando.

Rilate la argumenton pri diskriminaciado de adoptita filo, sed ne biologia, la greka registaro deklaris, ke la adopto fare de ekleziulo en Grekio estas kontraŭ-leĝa, do, oni ne povis agnoski ĝian validecon, ĉar la ekleziaj normoj ne rajtigas la monaĥojn havi idaron.

JUĜO DE LA EŬROPA KORTUMO PRI HOMAJ RAJTOJ

Unuanime la Kortumo decidis admision la apelacion. La juĝistoj deklaris, ke oni perfortis la artikolojn 8-an kaj 14-an de la Konvencio pri la Protektado de la Homaj Rajtoj kaj la Fundamentaj Liberecoj. Konkrete, la artikolo 8-a protektas la individuojn kontraŭ senbaza enmiksiĝo de la Administracio. Oni diris ankaŭ, ke antaŭaj juĝoj de la Kortumo deklaris, ke la rilatoj naskiĝantaj inter adoptanto kaj adoptito estas tute similaj al la familiaj rilatoj, do protektindaj laŭ la artikolo 8-a. Tiel, la rilatoj inter la adoptanta episkopo kaj lia nevo estas tute similaj al tiuj ekzistantaj inter biologia patro kaj filo, krome, dum la vivo de la episkopo li neniam malvalidigis la adopton realigita en Usono.

Do, la apelaciata juĝo de la Greka Supera Kortumo malobservis la artikolon 8-an de la Konvencio kaj pro tio, la apelacianto ne povis ĝui la familiajn rilatojn naskiĝintaj post la adopta proceso, ekzemple la uzon de la familia nomo aŭ la socian konsideron esti la filo de la adoptanta patro.

JURAJ VORTOJ

hipoteko

HIPOTEKO laŭ PIV estas la garantia rajto, starigita laŭleĝe, super nemovebla havo kaj asimilitaj, por sekurigi al kreditoro repagon de sumo ŝuldata de la posedanto de tiu havo. Tio estas, la hipoteko donas realan rajton super konstruaĵo.

Vortoj rilataj al “hipoteko”.

Hipoteki: ŝarĝi nemoveblan havon per hipoteko.

Mi hipotekis mian domon kaj mi ricevis 200.000 €.

Hipotekanto: la havanto de tiu konstruaĵo, li ricevas la monon.

Kreditoro: ĝenerale estas banko aŭ ŝparkaso, prenanta hipotekon super la domo.

Ĉe la hipoteka kontrakto la hipotekanto estas la posedanto de la nemoveblaĵo kaj la kreditoro estas la banko aŭ ŝparkaso pruntedonanta la monon.

Amortizi parton de la hipoteko: Malpliigi la amplitudon de la ŝuldo okazigita de la hipoteko, ĉu laŭ la tempo, ekzemple: 30-jara hipoteko kun monata partopago mil eŭroj pasas al 10-jara hipoteko kun egala monata partopago. Oni amortizis la hipotekon laŭ la tempo.

Oni povas ankaŭ amortizi parton del la hipoteko laŭ la mon-kvanto. Tio estas, 30-jara hipoteko kun monata partopago mil eŭroj pasas al same 30-jara hipoteko kun monata partopago 500 eŭroj.

Kompreneble kiu ajn parta amortizo de la hipoteko, ĉu laŭ la tempo, ĉu la mon-kvanto, okazas post pago de la hipotekanto.

Ampleksigi la hipotekon aŭ rehipoteki: pere de ampleksigo de hipoteko oni atingas de la kreditoro (banko aŭ ŝparkaso) pligrandigi la monon atingita dank'al la hipoteko. Ekzemple: oni atingis 200,000 € post hipoteki nemoveblaĵon, post kelkaj jaroj la ŝuldata mon-kvanto estas nur 100,000 €. Oni atingas ampleksigon de la hipoteko se oni reatingas

100,000 € (aŭ alia mon-kvanto) kaj oni daŭrigas la saman hipotekon. Se ni parolas pri “rehipoteki” la afero estas iomete malsama, ĉar oni nuligas la ekzistantan hipotekon kaj komenciĝas alia nova kun tiu nova mon-kvanto pruntedonita.

Interezo: estas la kompenso, kalkulita en procentoj, kurante pagenda de la havanto de la hipotekita nemoveblaĵo al la kreditoro. La interezo povas esti:

Fiksa interezo: La procento pagenda estas ekzakte fiksita de la kontrato kaj ĉiama por la tuta vivo de la hipoteka kontrato.

Variebla interezo: La procento pagenda ne estas egala dum la tuta vivo de la hipoteka kontrato, ĝenerale oni fiksas jaron post jaro, ĝi varias akorde al ĝeneralaj ekonomiaj cirkonstancoj.

Leĝo hipotekara: ĉe nacia leĝaro, tiu normo kiu rilatas al hipotekoj.

Hipoteka Svopo (el la angla *hypotecary swap*): Ene de variebla hipoteko, svopo aŭ hipoteka svopo, estas kontrato subskribita dum kiu ajn momento de la vivo de la hipoteko sur alia dokumento. Laŭ tiu svopa kontrato, la kreditoro certigas, ke la havanto de la hipoteka nemoveblaĵo ne pagos pro la hipoteka kontrato pli ol tiu kvanto difinita sur la svopa kontrato. La svopa kontrato ankaŭ difinas minimuman interez-nivelon.

Ekzemple: se laŭ svopa kontrato la interezo situiĝas inter 2% kaj 4%, la ŝuldanto ne pagos al la kreditoro pli altan interezon ol tiu 4%, tamen ankaŭ ne malpli ol tiu 2%, eĉ kaze ke la variebla interezo estus 1%. Ambaŭ niveloj estas konataj kiel la “plafona klaŭzo” kaj la “planka klaŭzo” de la svopa kontrato.

Inversa Hipoteko: laŭ ĉi tiu hipoteko la posedanto de nemoveblaĵo, kiu ĝenerale devas esti pli aĝa ol 65 jaroj, ricevas monon de banko aŭ ŝparkaso, pere de unika pago aŭ pere monata partopago, kompreneble la mon-kvanto dependas de la valoro de la konstruaĵo. Kiam la hipotekanto forpasas la heredantoj devos likvidi la ŝuldon al la banko. Se la heredantoj ne pagas al la kreditoro, ĉi tiu banko aŭ ŝparkaso rajtas vendi la nemoveblaĵon kaj atingi tiel la monon ŝulditan. La celo de ĉi

tiu inversa hipoteko estas plialtigi la viv-nivelon de la maljunuloj posedantaj propran konstruaĵon dum iliaj lastaj vivo-jaroj.

Se la hipotekanto ne pagas, ĉu estas eble doni la nemoveblaĵon al la kreditoro kiel pagon kaj tiel finiĝi ĉiajn ŝuldojn? Eblas nur, se tiu klaŭzo aperas sur la hipoteka kontrakto. Se tio ne aperas, la kreditoro rajtas vendi la nemoveblaĵon kaj preni la monon, se per tiu mon-kvanto la ŝuldo ankoraŭ ne finiĝas, la hipotekanto ankoraŭ devus pagi al la kreditoro la ceteran ŝuldon. Tio provokas, ke la hipotekanto restus sen domo sed kun ŝuldo, pro tio estus konvene enmeti la klaŭzon “*dono kiel pago*” sur la hipotekaj kontraktoj. Tiel, se la hipotekanto ne povas pagi la ŝuldon oni konsideras likvidita post la ricevo de la ne-moveblaĵo fare de la kreditoro.

JURAJ INFORMOJ

§ PALESTINO ALIĜAS AL UNESKO KIEL PLENRAJTA MEMBRO

La novaĵo pri la eniro de Palestino en UNESKO-n, dum la 36-a Ĝenerala Konferenco kaj la favora voĉdono de la plimulto el ĝiaj membroj, la 31-an de oktobro 2011, kaŭzis konfuzon al multaj personoj kiuj pensis, ke nur ŝtatoj rajtas aliĝi al internaciaj organizoj. Sciante estas, ke ĝis nun, Palestino estas parto el Israelo, kvankam estonte eble ili estos du sendependaj ŝtatoj, sed intertempe la Nacia Palestina Aŭtoritato petis sian eniron en diversajn internaciajn organizojn, inter ili Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

La aliĝpeto de la Nacia Palestina Aŭtoritato estis aprobita ĉe Unesko per favora voĉdono de 107 ŝtatoj, preskaŭ ĉiuj iberamerikaj landoj, Francio, Hispanio, aliaj eŭropaj landoj, Hindio, Ĉinio, ktp; 14 voĉdonoj kontraŭe (inter ili Usono, Germanio, Kanado kaj kompreneble Israelo) kaj 52 sindetenoj, inter ili Meksikio. Usono deklaris ne plu financi la programojn de Unesko.

S-ro MALKI, reprezentanto de Nacia Palestina Aŭtoritato petis la apogon de ĉiuj kiel *ĉefa kontribuo al la paco*, dum kontraŭe, Israelo plendis pri la decido kiel *trista tago kaj bremsado al la paco*.

Sed, kiel estis eble tiu debatinda akcepto?

Ĉu indas, ke ne sendependa ŝtato aliĝos al internaciaj organizoj? Ni ne forgesu, ke S-ro Mahmud ABBAS, la 23-an de septembro samjare, petis oficiale la plenan aliĝon de Palestino kiel plenrajtan membron de Unuiĝintaj Nacioj. Tiu agnosko konferus al Palestina Popolo statuson kiu permesus al ĝi denonci antaŭ la internaciaj kortumoj la israelan okupadon.

Fakte, la aliĝmaniero al la diversaj internaciaj organizoj dependas de ili kaj ĝiaj statutoj. Ekzemple, por aliĝo al Eŭropa Unio, oni bezonas kelkajn postulojn, nome, esti eŭropa ŝtato, ĝui sufiĉe bonan ekonomian situacion, plenumi la homajn rajtojn kaj akcepti kaj plenumi la eŭrop-unian leĝaron. Ni ne forgesu, ke Eŭropa Unio estas la nura superŝtata internacia organizo ĝis nun ekzistanta. La aliaj estas interregistaraj organizoj kaj la decidojn prenas la membroŝtatoj. Tamen, Unuiĝintaj Nacioj estas interregistara organizo, sed kun speciala superŝtata strukturo, ĉar unu el ĝiaj organoj, nome la Sekureca Konsilio, devas atingi por la plej gravaj aferoj, plimulton de ĝiaj membroj inkluzivante la favoran voĉdonon de la kvin konstantaj membroj kiuj havas vetorajton (Usono, Rusio, Britio, Francio kaj Ĉinio).

Por eniro en Unuiĝintajn Naciojn oni devas sekvi la 4-an artikolon de la Ĉarto de UN kiuj tekstas jene:

“Rajtas fariĝi membro de UN ĉiuj aliaj pacamaj Ŝtatoj kiuj akceptas la sindevigon de ĉi tiu Ĉarto, kaj, laŭ la opinio de la Organizaĵo, kapablas kaj volas plenumi tiujn sindevigojn. Tia Ŝtato fariĝas membro de UN per decido de la Ĝenerala Asembleo surbaze de rekomendo de la Sekureca Konsilio”.

La art. 5-a kaj 6-a tekstas, ke surbaze de rekomendo de la Sekureca Konsilio, la Ĝenerala Asembleo povas suspendi la rajtojn kaj privilegiojn de iu membro, kaj eĉ sammaniere, povas eksigi membron de la Organizaĵo. Se la Sekureca Konsilio aprobus la eniron de nova membro, ĝis nun certe devus esti unu ŝtato, poste la Ĝenerala Asembleo per plimulto de du trionoj de la membroj kiuj ĉeestas kaj voĉdonas, akceptos la novan ŝtaton (art. 18-a de la Ĉarto UN).

Do, la aliĝo al Unuiĝintaj Nacioj estas multe pli malfacila ol al aliaj organizaĵoj, ĉar oni bezonas la favoran voĉdonon de la konstanta membroj de la Sekureca Konsilio, kaj pri la eniro de Palestino certe Usono uzos ĝian vetorajton.

Pro tio, Unesko aperis por Palestino kiel plej favora internacia organizaĵo por agnoski ĝian aliĝrajton, pro la fakto, ke en Unesko oni bezonas nur la favoran plimultan voĉdonon po du trionoj de la membroŝtatoj, post favora rekomendo de la Ekzekutiva Konsilio. Krom tio, Unesko ĉiam apogas la sendependemajn klopodojn de la popoloj, helpas la evolulandojn kaj havas kiel celon defendi la kulturalan diversecon de ĉiu popolo el la mondo. Nevane, Unesko multe helpas la kulturajn kaj edukad-programojn kaj la diversecon de la popoloj de la mondo. Kiel asertis la Prezidanto ABBAS, dum la ceremonia pri hisado de la palestina flago ĉe Unesko, tiu agnosko ege kontribuas al la zorgado de la palestina identeco.

La Palestina Aŭtoritato daŭrigos sian vojon utiligante la aliĝon al Unesko por serĉi ĝian agnoskon en diversaj UN-agentejoj, en kiuj la aliĝmaniero estas malsimila inte rili.

Aliflanke, akcepti ne sendependan ŝtaton en internacia organizaĵo, antaŭ solvi la politikan problemon inter la partioj, malfermas la pordon al peto ĉe Unesko de aliaj regionoj de multaj ŝtatoj kiuj deziras senti sin sendependajn.

Dr-ino Rafela Urueña Álvarez

§ **DENOVE PRI MANKO DE AKVO**

Unu plian fojon, UNESKO atentigas la mondon pri la graveco de la manko da akvo en multaj partoj de nia planedo. Kompreneble, la afero ne estas io nova, fakte ni estas ene de la dekjariĝo de Unuiĝintaj Nacioj (UN), kiu sub la devizo “*la akvo fonto de la vivo*”, deklaris la jarojn 2005 ĝis 2015 kun la celo solvi la problemon de la malabundo de akvo en multaj landoj kaj regionoj de nia planedo.

Nun, okaze de Tutmonda Forumo pri akvo, okazinta en la franca urbo Marsejlo, de la 13-a ĝis la 17-a de marto 2012, UNESKO asertis,

ke plia peto de nutraĵo kaj la rapida urbanizado kaj ĉefe la tutmonda klimatsanĝo, premas pli kaj pli tiun malabundan rimedon.

Tiu senprecedenca deziro kaj bezono de akvo minacas la plenumon de la jarmilaj evoluigaj celoj, kiun UN starigis en Novjorko 2000, plenumendaj antaŭ ol 2015 kaj konsekvence, faras, ke UN kaj UNESKO devus repensi la tutan agadon, ĉar, kiel asertas S-ino Irina BOKOVA, Ĝenerala Sekretariino de ĉi lasta organizo, *“en tiu ĉi kunteksto, la estonteco estas pli necerta ol neniam, kaj eblas, ke la riskoj pligraviĝos”*.

Laŭ informo, la nombro da personoj kiuj havos aliron al trinkebla akvo, en la evoluantaj landoj, estos 86% en 2015. Tamen, ankoraŭ restas mil milionoj da homoj sen akvoaliro kaj tiu nombro pligrandiĝos. Aliflanke, oni konstatas, ke dum kreskas tre rapide la urba loĝantaro en la mondo, la kreo de kloakservoj ne respondas al tiu bezono, rilate al la tutmonda urba loĝantaro, kiu, laŭ antaŭvidoj duobliĝos en 2050, kiam eblos atingi 6,300 milionojn da homoj.

La kreskanta bezono de nutraĵoj, la grava fenomeno je aĉeto de grundoj, ĉefe en Afriko, por biokarburajoj, kiuj lasas sen nutraĵoj multajn kamparanoj, kaj la klimatsanĝo estas neaj konsekvencoj. La klimatsanĝo, kaŭzita de la homa agado kaj ne nur de la propra naturo, havas gravajn konsekvencojn, nome, degelon de la glaĉeroj, varmfrapojn, malsanojn, kreskon de la marnivelo, malpli da pluvo kaj humidejoj, sekajn riverojn kaj lagojn, ktp.

Fakte, tiu informo reagnoskas, ke 90% el la naturaj katastrofoj okazas pro tiu klimatsanĝo, kaj ke estas Afriko kaj Azio kiuj plej sentos ĝin ĝis 2030.

La tuja konsekvenco agnoskata ankaŭ de UN estas la ofteco de interŝtataj kaj regionaj konfliktoj pro manko de akvo, kiuj minacas la pacon kaj internacian sekurecon en la mondo. La plej damaĝitaj per tiuj krizaj situacioj estas, kiel ĉiam, la plej malriĉaj landoj. Problemoj

tiel oftaj, kiel krizoj en Afriko, konfliktoj en Mezoriento, ĉefe inter Israelo kaj Palestino pro la regado de akvo de la rivero Jordano, stariĝas pro la aliro kaj kontrolo de la akvaj rimedoj.

Nuntempe, kiam grava ekonomia krizo minacas la eŭropuniaj landojn, kiuj plej multnombre financis la evoluhelpon, UNESKO alvokas la tutan internacian komunumon por apogi finance la plej taŭgan kaj justan agadon rilate tiun akvan rimedon, ĉefe vide al la evoluantaj landoj. Se tio ne efektiviĝas certe ne eblos atingi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn.

NOTO: Raporto de UNESKO “*La demarŝoj pri akvo, ene de necerta kaj riska kunteksto*”. Marto 2012.

Dr-ino Rafela Uruëña Álvarez

§ **VET-LUDISTOJ RAJTAS UZI STATISTIKAJN KALKULOJN**

La Suprema Kortumo de Hispanio juĝis, ke oni ne rajtas malebligi la eniradon en la kazinojn al tiuj vetantoj kiuj kalkulis la oftecon de la apero de konkretaj numeroj en la ruleto, do, ili kapablas antaŭkoni la eblajn rezultojn de tiu ludo. La juĝo konsideras, ke tiuj ludantoj akriĝas sian inĝenion, do, oni proponas al la kazinoj agadi same.

La juĝo rifuzas apelacion prezentanta de la Kazino de Madrido, kiu malrajtigis al kelkaj homoj eniri en tiun ejon. Tiu entrepreno opiniis, ke tiuj statistikaj teknikoj estas “kontraŭleĝa lud-agado”, kaj tio estas sufiĉa kialo por malrajtigi la eniron en la kazinon laŭ leĝo de la jaro 1979. La proponanta demando estas, ĉu ĉiuj numeroj havas la samajn ŝancojn ĉe ruleto? Ne, tute ne. La triviĝo de la ruleto pro la uzo, la fleksebleco de la kubetoj kie la pilketo falas kaj kelkaj aliaj faktoroj provokas, ke kelkaj numeroj ripetiĝas pli ofte ol aliaj tra miloj

da vetoj. La diferencoj inter la numeroj ests tre malgrandaj, eĉ minimumaj, tamen pacience estas eble trovi tiujn mankojn kaj tiel veti kun grandaj eblecoj atingi premiojn. Tiujn kalkulojn, kaj kun la helpo de la komputiloj, faris la membroj de la familio García-Pelayo en Hispanio, konataj profesiaj vet-ludantoj. Kelkaj el ili vet-ludis, aliaj notis la rezultojn. Ofte, ili ne trafis la rezultojn, tamen post multaj vetoj ili atingis grandajn premiojn. La respondeculoj de la Kazino, ĝenataj de la grandaj premioj atingitaj ĉiam de la samaj homoj, prezentis plendon ĉe la Madrida Kortumo, tamen ĉi tiu juĝejo decidis, ke la membroj de tiu familio ne agadis kontraŭleĝe.

Apelacio prezentata ĉe la Supera Kortumo de Hispanio kontraŭ tiu unua juĝo, denove pravigis la agadon de la vet-ludantoj. Tiu juĝo deklaris, ke la vet-ludantoj ne manipulis la ruleton, do ili ne influis sur la pilketo. La juĝo ankaŭ diras, ke la vet-ludantoj uzis sian inĝenion kaj la komputilojn por diveni, ke ĉe la ruletoj kelkaj numeroj aperas pli ofte. Sed tio suldiĝas ne al la agado de la vet-ludantoj, sed al minimumaj ne-perfektaĵoj de tiuj maŝinoj. La Kortumo deklaris, ke la Kazino rajtas defendi sin de tiu sistemoj kalkuli la ne-perfektaĵojn de la ruletoj, tamen la solvo neniam devas esti malrajtigi la eniron de la vet-ludantoj, sed ja perfektigi la maŝinojn aŭ ŝanĝi ilin pli ofte, ĉar definitive la vet-ludantoj ne friponis ĉe la ludo.



Esperanta Jura Asocio



- [Kio estas Esperanta Jura Asocio E.J.A.?](#)
- [Renkontiĝo de EJA kadre de la 95-a Universala Kongreso de Esperanto en Havano \(Kubo\) 2009](#)
- [Kolekto Juraj Kalendaroj](#)
- [Juraj Revuoj](#)

Vi estas la vizitanto: **566**

[Vizit-Libro](#)

TTT-paĝo de Esperanta Jura Asocio ĉe
<http://www.esperantajuraasocio.ueuo.com>



Eldonita en la urbo CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio) junio 2012.

Prezentita en GAILLIMH / GALWAY (Irlando) okaze de la 9-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio, 16-a ĝis la 20-a de julio 2012.

Kaj en la urbo HANÓI / HÁ NÔI (Vjetnamo), okaze de la 97-a Universala Kongreso de Esperanto, 28-julio – 4-a aŭgusto 2012.